

LA LAMPIRO

60-a jaro, numero 158, 2019: 4



La diskurso de Renata Ventura

LA LAMPIRO

60-a jaro, numero 158, 2019: 4

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Graficarangô: Cristovão Rocha Sousa

Revizianto: José Roberto Tenório



La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183
easp.org.br | contato@easp.br

Jarkotizo por 2019

Simple membro.....R\$ 150,00.
Subtena membro.....R\$ 300,00.
Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

Deĵoroj:

merkredo: 15h - 17h; ĵaŭde kaj
vendredo: 13h - 17h; sabate: 9h - 12h

(escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la
deĵoro daŭras de la 9h ĝis la 18h)

Estraro

Prezidanto: Genildo Martins Coelho

Vicprezidanto: Marcos Zlotovich

1-a Sekretarino: Anna Lobo de Carvalho

2-a Sekretarino: Sidnéia da Conceição Beall

1-a Kasisto: José Roberto Tenório

2-a Kasistino: Neide Aparecida de Freitas

Propaganda Direktorino: Cristina C. de Graaf

Konsilantaro

Paulo Sérgio Viana, Audino Castelo Branco kaj
Aparecida de Souza Araújo

Anstataŭantoj

José Mauro Progiante kaj José Martins Coelho

ENHAVO

6

Malferma
Festparolado en La
54-a Brazila
Kongreso de
Esperanto, Goianjo,
20-23 Junio 2019

18

Pri kino kaj
aliaj artoj:
Grandaj Okuloj

23

Super la Juro, kaj
Justeco

15

Belartaj Konkursoj
de UEA: Nova
Entuziasmo!

19

Brazilano en la
Estraro de Universala
Esperanto-Asocio

24

Kial Filozofio kaj
Sociologio en Bazaj
Lernejoj?

16

Sudminasa
Renkontiĝo de
Esperanto (SUMIRE)

20

Meditaĵoj de Millôr
Fernandes

25

Lingvaj Respondoj

17

Iom da Poezio: La
Ĵazpoezia Stilo de
Langston Hughes

21

Financoj: la iluzio de
kono kaj la problemo
de la eksceso de
memfido en la akcia
merkato

LA

Lampiro



Vortoj de la prezidanto

KATEDRALO DE SAN-KARLO BORROMEU

Ĉi tiu numero de La Lampiro estas la lasta, antaŭ nia ŝtata kongreso en San-Karlo (je la 12-13-a de oktobro 2019). Estas do tempo por vigla alvoko al nia samideanaro. Kvankam ĉi-jare nia ĉefa evento estos relative nelonga, tamen zorge preparata programo garantias riĉan enhavon.

Certe ne necesus konsideri ĉi tie la gravecon de niaj kongresoj. En tempo de ĉie reganta interreta agado, ni tamen ne forgesu, ke personaj kontaktoj estas plu nepre necesaj. Lingvan movadon (kiel la Esperanta) oni devas kultivi ankaŭ per ĉeesta energio. Ĝi dependas interalie de niaj manpremoj, brakumoj kaj homa varmo. Kio okazas inter amikoj kaj kunidealanoj, kiam ili persone renkontiĝas por interŝanĝi ideojn kaj sentojn, tio estas certe nemalhavebla kaj neanstataŭigebla.

Mi do invitas vin ĉiujn al amika renkontiĝo en San-Karlo, en oktobro. Ĝis!

GENILDO MARTINS COELHO



LA URBO DE SÃO CARLOS

Vortoj de la redaktoro

Por ĉi tiu numero de nia revuo ni devas elstarigi la laboron de nia nova grafikisto, samideano Cristóvão Rocha. Bonvoleme li pretas servi la asocion volontule, por prepari nian publikaĵon. Pro tio ni kore dankas.

Same valora estas la revizia kunlaboro de nia kasisto José Roberto Tenório, kiu zorge purigas niajn tekstojn per atenta korektado. Denove dankegon!

Al la legantoj, ni denove petas opiniojn por plibonigo, novajn ideojn kaj kritikojn. Krom, kompreneble, viajn ideojn en formo de teksto mem por la revuo. La Lampiro estu por ni kanalo de kleriĝo kaj kulturo.

PAULO SÉRGIO VIANA

Malferma Festparolado en La 54-a Brazila Kongreso de Esperanto, Goianjo, 20-23 Junio 2019

RENATA VENTURA

KARAJ GESINJOROJ, SAMIDEANAJ GEAMIKOJ

Kiam oni vokis min por fari la malferman paroladon, mi konfesas, ke mi panikiĝis. Mi nur scias verki librojn, ne scias prelegi! Kelkaj roluloj miaj tion scias, tamen pri mi... Mi estas treege timida por tio... Io tre facila, ĉu ne?! Krei paroladon, meti ĝin en la buŝon de ia rolulo, kaj li elturniĝu! Finfine. Post kiam mi faris la frenezaĵon akcepti ĉi tiun inviton, mi pensadis pri tio, kion mi povas diri tie ĉi, ankoraŭ ne sciatan de vi? ... La plejmulto el vi jam scias ĉion pri Esperanto. La plejmulto el vi lernis Esperanton ĝuste ĉar vi kredas la revon de Zamenhof kaj scias, ke ĉi tiu revo funkcias. Vi scias, ke neŭtrala internacia lingvo kapablas unuigi la homojn... ĉar vi jam vidis iliajn efikojn en vi mem kaj en la aliuloj. Eble vi jam estas eĉ partoprenintaj en internaciaj

kongresoj, farintaj plurajn nekredeblajn amikumojn pere de Esperanto, malkovrintaj milojn da aferoj, danke al tiu mirinda interkultura ŝanĝo. Do, kion mi povas diri tie ĉi, eble farantan ian diferencon?

Rerigardante la kongresan temon, Esperanto, kulturo kaj arto: unuigintaj en la konstruado de nova socio, mi ekpensis, kiu estus la ĉefa trajto, kiun Esperanto, kulturo kaj arto havus komune, kiu faras, ke tiuj tri posedu tiun tiel grandegan potencaĵon transformi kaj plibonigi la mondon. Kion tiuj tri povus fari, kaj jam faras, por instigi la konstruadon de mondo havanta pacon kaj interkomprenon inter la homoj?

Kaj mi alvenis al konkludo:

La tri instigas la scion, la empation



Nadia Lima

Renata Ventura kaj Nadia Lima, famaj aŭtorinoj de Brazilo

kaj la respekton.

La tri estas pontoj... kiuj konektas nin al aliaj homoj.

Per Esperanto kaj arto, ni ekscias pri aliaj kulturoj kaj aliaj pensmanieroj; per ambaŭ, ni lernas esti afablaj rilate la aliajn. Kaj tiuj estas esencaj trajtoj por la konstruado de pli bona mondo.

Sen empatio kaj sen helpema kaj afabla rigardo al tiu, kiu estas malsama ol ni, la homaro ne helpas al si kaj ne antaŭeniras.

Sed kiel Esperanto kaj arto faras tion? Kiel ili helpas por nia unuigo? Esperanto faras tion, kiam ĝi kontaktigas nin kun personoj de la tuta mondo.

Faciligante ĉi tiun kontakton por ni, ĝi faras, ke ni sentu pli kaj pli da volo scii pri tiu, kiu havas kulturon pli malsaman, ol la nia.

Tuj post kiam mi malkovris Esperanton, mi raviĝis. Mi raviĝis pro la ideo pri neŭtrala internacia lingvo, kiu apartenas al neniu lando, havas neniun posedanton kaj trudas al neniu la potencon de alia nacio. Mi raviĝis pro la ideo pri lingvo tiel facile lernebla, tiamaniere ke se la tuta mondo decidus adopti ĝin kiel duan lingvon, post malmulte da monatoj ĉiuj komuniĝus tra la tuta mondo sen malfaciloj, ŝanĝante spertojn kaj ideojn... kaj ĉio tio sen ia ajn lingva aŭ ekonomia baro, ĉar

malmulte da lecionaj monatoj
sufiĉus por ekkomunikiĝi kun la
mondo!

Mi havis la nocion, ke tia lingvo
povus ampleksigi ĉies horizontojn:
faciligi la kontakton kun aliaj
kulturoj, kun aliaj pensmanieroj... kaj
tio alportus pli grandan unuiĝon
inter la popoloj, malpligrandigus la
kulturan antaŭjuĝon, malfortigus la
malamon, finfine, ĝi igus ĉiujn
percepti, kiel la homoj en la tuta
mondo estas

fundamente egalaj!...

Ili sentas la samajn
aferojn, ili same
emociiĝas, kaj ili ja
povas fariĝi niaj
geamikoj!

Kaj pri la arto? Kion
ĝi povas fari kaj
FARAS por la
mondo?

Dum Esperanto
ankoraŭ ne estas adoptita de ĉiuj, la
ARTO helpadas nin per bela
maniero proksimiĝi nin al la alia. ...
Maniero korligi nin al tiu, kiu estas
malsama ol ni.
Ĉiaj formoj de ARTO ampleksigas
nian scion pri la mondo. Ĉiaj formoj
de ARTO kontaktigas nin kun
malsamaj kulturoj kaj vivmanieroj.
Sed ili faras pli ol tio. Ili tuŝas nian

koron. Ili ŝanĝas nin kiel homojn.
La danco inspiras nin esti pli bonaj
kaj vidi la belecon ekzistantan en la
aliaj homoj; la pentrarto emociigas,
instigas nin zorge rigardi la alian tie
pentritan... la muziko kapablas
konekti homojn el pluraj landoj pere
de amo al ia muzikistaro, igi nin
ekadmiri alian kulturon aŭ ian
regionon de nia lando mem, helpi
nin eliri el deprimiĝo aŭ eĉ senarmigi
memmortigonton.

Dramserio

kapablas ŝanĝi ies
vidpunkton pri ia
afero; la kinaro
sentebbligas nin rilate
situaciojn, kiuj
antaŭe eĉ ne
montriĝis gravaj por
ni, la teatro ĉiam
pensigas nin, eĉ se la
teatraĵo estas
komedio... Ĉiuj tiaj
artaĵoj proksimigas

nin al la aliaj. Kaj foje eĉ al ni mem.
Kaj ĉar ni troviĝas kortuŝaj kaj
bonfartaj, ni volas vidi ankaŭ la
aliulon bone farti.
Kaj pri la literaturo? ;-)
Mi decidis paroli pri ĝi laste, ĉar eble,
per la literaturo, mi povos doni
ekzemplon eĉ pli klaran pri tio, kion
la arto povas fari por la mondo.

La literaturo, dum ĝi amuzas kaj

“KAJ MI ALVENIS
LA KONKLUDO:
LA TRI INSTIGAS LA
SCION, LA EMPATION
KAJ LA RESPEKTON”

emociigas nin per siaj rakontoj, faras ion tre potencon, kiun malmultaj homoj perceptas. Ĝi instigas en ni la senton pri empatio.

Empatio estas la kapablo meti sin en la lokon de aliulo kaj senti la doloron, kiun li sentas. Esenca kapablo, por ke ni lernu havi pli da kompato al la homoj. Kaj la literaturo instruas nin fari tion per nekredible rekta maniero.

Legante romanon, ni estas ĵetitaj en situacion kaj ekvidas ĝin laŭ la okuloj kaj pensoj de ĝia protagonisto; kaj tiel intense, ke ni ekhavas la emociojn de tiu rolulo! Se la romano estas pri patrino perdita meze de milito, laŭ tio, kiel ni legas tiun libron, ni preskaŭ ekvivas la vivon de tiu patrino, ni eniras en ŝiajn pensojn, en ŝiajn timojn, ni sentas la mortodoron kaj la bombotremon kune kun ŝi, ni ektimas flanke al tiu kompatinda junulino, kvazaŭ ni estas tie, ni timas pro la vivo de ŝia fileto, kiu troviĝas ekstere, en danĝero, kvazaŭ tiu knabo estas nia; ni ploras kune kun la patrino, ni KOLERIĜAS kune

kun la patrino. Kaj tio estas tre potenca. Ne gravas kiu ajn estas la rolulo, la libro metas nin en liajn ŝuojn, estu tiu rolulo familiestro serĉanta laboron, knabineto volanta fariĝi parto de siaj kulturaj tradicioj aŭ adoleskanto provanta forkuri de milito, kiu detruas sian landon, kaj, fine de la legado de tia libro, ni eliras ŝanĝiĝintaj. Ni eliras kun la volo ŝanĝi la aferojn, brakumi la

suferantojn, iel helpi la REALAJN homojn, kiuj vivas la samon.

Tiu estas la potenco de la arto. Tiu estas la potenco de la literaturo.

Kaj tiu potenco, kiun la literaturo havas, igi nin pli empatiaj, jam

transformis la mondon pli ol unu fojon.

Antaŭ kelkaj jarcentoj, amuzaĵo por la homoj estis iri al la placo por vidi aliajn personojn esti brule mortigitaj. Oni trovis tion amuza. Antaŭ kelkaj jarcentoj, oni vidis nenian problemon pri sklavigo. Oni sciis, ke ĝi ekzistas kaj por ni tio eĉ ne estis grava.

“MI HAVIS LA
NOCION, KE TIA
LINGVO POVUS
AMPLEKSIGI ĈIES
HORIZONTOJN”

Sed ekde la dek-sepa kaj dek-oka jarcentoj, io okazis. Pro la inventitaĵo de Gutenbergo, libroj, kiuj antaŭe tre malmulte influadis, ĉar ili estis multekostaj, raraj kaj legitaj de nur kelkaj privileĝitoj, post malpli ol du jarcentoj fariĝis ĉiutagaj objektoj en Okcidento. La homoj komencis legi pli; moveblaj bibliotekoj ekportis literaturon por la popolo, popularigante tiel la legokutimon, kaj, subite, ĉiuj estis legantaj romanojn! Romanoj, kiuj rakontadis pri subpremataj roluloj, pri sklavoj, pri kondamnitaj homoj..., romanoj, kiuj rakontis pri la aventuro de orfaj infanoj surstrate, pri gepatroj apartigataj de siaj gefiloj por suferi punojn... Kaj, legante tiujn romanojn, la homoj ekeniris, eĉ se dum kelkaj horoj, en la perspektivon de iu vipe punata, aŭ brule mortigata, aŭ nejustece suferanta, kaj tio ekdoloris la homojn, kiel neniam ĝi doloris antaŭe.

Post malmulte da tempo, oni abolis la hompendigon, finis la sklavigon, fortege ekkritikis ekzekutojn kaj linĉadojn.

Kion oni antaŭe trovis normala, kiel

“LA LITERATURO
INSTIGAS EN NI LA
SENTON PRI EMPATIO”

la homa sklavigo, tio ekfariĝis abomenindaĵo por la leganto de la libro “La Kabano de Onklo Tom”, kiel ekzemplo. La libro de Harriet Beecher Stowe, kiu rakontis pri la vivo de sklavo, tiel emociigis la homojn, ke ĝi fariĝis la plej disvendata romano en la dek-naŭa jarcento kaj unu el la kataliziloj de la usona abolicisma movado.

Tiuj homoj jam vidis antaŭe aliajn esti vipataj en la reala vivo, tamen estis necese, ke unu libro transportu ilin al la vidpunkto de tiu, kiu estis

suferanta. Kaj tio ŝanĝis ĉion. Ĉar tio tuŝis ilian koron.

La samo plu okazas nuntempe. La

potenco de la literaturo ne malpligrandiĝis. Mi,

ekzemple, perceptis, ke mia libro estis funkcia, kiam instruisto venis por danki min, dirante, ke pro la juna protagonisto de mia libro, li komencis kompreni pri sia lernanto. Lernanto, kiun li antaŭe timis, kaj pri kiu, nun, li eksciis kiel helpi. Danke al mia protagonisto, simila al lia lernanto, ĉi tiu lernanto ne plu fariĝis minaco antaŭ la okuloj de la instruisto kaj transformiĝis en nuran timigatan infanon, kiu bezonis

helpon.

Tiu estas la potenco de la arto. Ĝi igas nin kompreni la aliulojn. Ĝi igas nin fervori por ili.

Esperanto faras la samon: ĝi proksimigas nin al la homoj! Kaj kiam ni amikumas kun iu alilandano, iu ajn novaĵo pri tiu lando afekcias nin pli, ĉar ni havas amikon, kiu loĝas tie. Tiu novaĵo fariĝas io persona por ni. Se ni

havas japanan amikon kaj cunamo invadas lian urbon, tio kaŭzas por ni pli da angoro, ol se ni konus neniun tie. La samo okazas, se ni havas geamikojn en Israelo kaj en Palestino: havante konatojn en la du flankoj de la konflikto, estas

neeble ne deziregi, ke ambaŭ landoj atingu interkomprenon kaj sukcesu trovi pacan solvon KUNE. Esperanto TRE faciligas tian internacian kontakton, kaj ankaŭ pro tio ĝi estas tiel nekredbla ilo por la PACO..., tiamaniere, ke se ĝi estus disigata pere de la ceteraj homoj en la planedo, ĝi JA povus helpi ŝanĝi la mondon.

“MI NE SCIAS, ĈU
PRO LA FAKTO, KE ĜI
ESTIS KONCEPTITA
ĜUSTE POR TIO,
POR UNUIGI LA
HOMOJN”

Ĉar nur per la scio pri la aliulo oni ne plu timas tiun aliulon kaj eksentas afablecon pri li! Oni ekfervoras por li!

Kaj tio estas revolucia!

Imagu, se ĈIUJ homoj en la planedo lernus Esperanton kaj ekvivus tiun revolucion en ili mem... En iliaj manieroj percepti la mondon. Esperanto, pli ol iu ajn lingvo,

inklinas nin voli scii pri la aliulo. Mi ne scias, ĉu pro la fakto, ke ĝi estis KONCEPTITA

ĜUSTE por tio, por unuigi la homojn, por faciligi la kontakton inter ili, kiel lingvo por paco, mi ne certas. Mi nur scias, ke dum la procezo lerni Esperanton, oni ne

lernas nur paroli. Oni lernas ankaŭ aŭdi. Oni lernas interesigi pri la aliulo, pri la kulturo de la aliulo, pri la opinioj kaj vivmanieroj de la aliulo. Imagu, se la tuta homaro ekricevus ĉi tiun instigon pere de Esperanto. Nun, imagu pli. Imagu la tutan mondan literaturon, kun la tuta potenco, kiun mi menciis al vi, tradukita en Esperanton. Pensu pri la

alio, kiun ni havus al verkoj kaj romanoj neniam tradukitaj en la portugalan. Multfoje eĉ ne en la anglan. Romanoj hindaj, romanoj mozambikaj, romanoj rusaj, arabaj, jugoslavaj. Imagu ĉiujn tiujn malsamajn rigardojn alireblaj por la homaro; tuŝantaj ĉies korojn per siaj rakontoj kaj roluloj.

Ĉu tia revolucio ne helpus la mondon fariĝi pli paca? Pli respektama? Pli empatia?

Mi deziras konkludi per pensado pri la nunaj tagoj kaj per sugesto por ni, kiuj troviĝas tie ĉi.

Ĉiuj ni povas percepti, ke ni troviĝas en nacia kaj tutmonda krizo pro manko de komunikado kaj manko de empatio. Eĉ la parolantoj de sama lingvo ne komprenas sin. Tio okazas ĉi tie en Brazilo, en Usono, en Eŭropo... ĉie.

Bedaŭrinde, nuntempe la homoj multe pli legas novaĵojn en "Vacapo", ol romanojn. Kaj, eble pro tio, nia empatio pri la aliulo malfortiĝas: Homoj atakantaj unuj la

aliajn, malŝate parolantaj pri la aliulaj timoj kaj maltrankviloj... Kaj tiu manko de empatio fariĝas tro peza por ni.

Nuntempe, kunparoli la saman lingvon ne montriĝas io sufiĉa por interkompreni kaj respekti nin.

Do, mi demandas: konsiderante ĉion, kion ni jam lernis per Esperanto, kion NI povas fari por plibonigi tiun aferstaton? Kion NI

povas fari por batali kontraŭ tiu interna kolero nin konsumanta?

Mi ne scias pri vi, tamen estas momentoj, en kiuj ankaŭ mi estas mordata de la malamo-besteto.

Ĉefe kiam mi vidas defendanton de aferoj, pri kiuj mi

malkonsentas kaj kontraŭ kiuj mi pasigas la vivon batalanta; kiel perforto, netoleremo, mortopuno...

Sed se Esperanto instruis al ni ion, tio estis rigardi tiun, kiu estas malsama ol ni per afableco. Trakti homojn de malsamaj kulturoj per scivolemo kaj amo, malgraŭ la diferencoj!

Kaj mi TRE VOLAS sukcesi transigi

“TIU ESTAS LA
POTENCO DE LA
ARTO. ĜI IGAS NIN
KOMPRESNI LA
ALIULOJN.”

tiujn valorojn por mia konduto ankaŭ tie ĉi! Kun tiuj brazilanoj, kiuj opinias malsame, ol mi! Ĉar nur per afabla interparolado ni sukcesos nin kompreni! Ĉi tiu estas la vojo por mondo de paco kaj toleremo, kiun ni volas! La vojo por dialogo kaj amemo al la aliulo! Malutilas ami nur la eksterlandanon.

La celo de Zamenhof, dum li iniciatis Esperanton, estis unuigi la popolojn, alporti interkomprenon kaj pacon inter la homoj.

Se ni fakte volas transformi ĉi tiun Zamenhofan revon en realaĵon, en la nunaj tagoj, ni bezonas fari ion plian, ol simple disvastigi la neŭtralan lingvon internacian.

Ni bezonas transpaŝi. Ni bezonas VIVI la idealojn de tiu lingvo ankaŭ en nia ĉiutago. Ekzerci la toleremon, la serĉadon por interkompreno de la aliulo, por scii, per respekto kaj afableco, pri la ideoj kaj sentoj de la aliulo... ĉar nur TIEL ni ŝanĝos ion. Spertante la mesaĝon de Esperanto en ni mem!

...

Esperanto jam TIOM instruis al ni

pri scivolemo, pri respekto al la aliulo, pri simpatio kaj frateco! Kial ne transigi tiujn lecionojn por nia ĉiutago ankaŭ tie ĉi? Ĉu ne estus mirinde? Ĉu ni ne estus ekzercantaj tion, kion Esperanto predikas?!

Mi scias, ke estas malfacile. Sed se ni volas, ke la paco kaj la frateca dialogo iam regu sur la Tero, ni devas alporti pacon al niaj propraj koroj. Kaj por niaj interrilatoj kun la aliulo, en nia propra lando.

Pli ol iam, la mesaĝo pri interkompreno de Esperanto fariĝas necesa. Pli ol iam, la frateca dialogo estas necesa.

Do, kiel diradis Gandhi, “ni estu la ŝanĝo, kiun ni volas vidi en la mondo!”

Kiam ni parolos kun aliaj brazilanoj, ni klopodu aŭdi opiniojn kontraŭajn al niaj per la sama scivolemo kaj la sama afableco per kiu ni aŭdas alilandonon paroli pri sia propra kulturo! Ni uzu nian sperton pri interkultura scivolemo por havi la saman ravan rigardon pri nia samlandano mem, kiu opinias malsame, ol ni! Tial ke, se li opinias malsame, tio estas ĉar ankaŭ li havis kulturon malsaman, ol nia, vivis

“IMAGU, SE ĈIUJ
HOMOJ EN LA
PLANEDO LERNUS
ESPERANTON...”

aliajn spertojn, aŭdis aliajn homojn laŭlonge de sia vivo, eĉ loĝante en la sama lando! Kaj se ni traktos tiun, kiu opinias kontraŭe al ni per la sama afableco per kiu ni traktas eksterlandanon havantan malsaman kulturon, ni jam estos ŝanĝantaj la mondon. Eĉ se nur iomete!

Kaj Esperanto jam estos venkinta. Ni ekzercu, dum ĉi tiu kongreso, tiun dialogon respekteman kaj ameman. Ni ekzercu, dum ĉi tiu kongreso, la aŭdadon kaj komprenadon. Ĉar ĉiuj ni estas homoj havantaj timojn, dubojn, malcertecojn kaj pacajn revojn; kaj ĉiu homo, eĉ havanta malsamajn opiniojn, indas je nia afableco kaj nia scivolemo. La arto instruis al ni tion.

Se ni ne lernos aŭdi kaj respekti la aliulon, ne ekzistos ebla vojo por la paco, kiun ni serĉas. La paco IRAS laŭ tiu vojo. Ĉar per malamo, neniu aŭdas iun ajn.

Per malamo, ne ekzistas komunikado, nek interŝanĝado de

ideoj, kaj tio estas la neado de Esperanto. Mi certas, ke se ni provus fari tion ekde hodiaŭ..., ekde ĈI TIU kongreso, Zamenhof fieriĝus, ĉar ni efektivigus lian revon en ni mem.

Verŝajne, ŝanĝante nian sintenon rilate la aliulon, ni eble sukcesos ekŝanĝi ankaŭ nian mondon, per nia ekzemplo pri amemo kaj respektemo al la aliulo, ĉu ne?!

Multaj diros, ke mia prelego parolas pri revo neebla; ke tiu, kiu esperas, ke la idealo de Esperanto povos plibonigi la aferojn, estas naivulo. Sed, laŭ la diro de rolulo mia, “Ĉiu revulo estas taksata kiel naivulo ĝis la tago kiam lia ideo ŝanĝas la mondon.”

Verŝajne, post kelkaj jardekoj, la estontaj

generacioj rigardos la mondon, kiun ni kunkonstruis kaj diros, pri la esperantistoj en ĉi tiu hodiaŭa kongreso, la frazon de la poeto kaj aktoro Jean Cocteau: “Ne sciante, ke tio estis neebla, oni iris tien kaj ĝin faris.”

Dankon! ■

“SE NI NE LERNOS
AŬDI KAJ RESPEKTI
LA ALIULON, NE
EKZISTOS EBLA
VOJO POR LA PACO,
KIUN NI SERĈAS...”

Belartaj Konkursoj de UEA: Nova Entuziasmo!

PAULO SÉRGIO VIANA

Literaturo estas gravega elemento en la evoluado kaj pluvivado de nia lingvo Esperanto, kaj tio validas ĝis la nuna tempo. Same kiel en la vivo de ĉiu lingvo en la mondo. Tial, la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio de multaj jaroj estas ankaŭ grava iniciato, kiu celas sproni verkemulojn al produktado de valora materialo, kiu pli kaj pli riĉigunian kulturon. Pluraj elstaraj, famaj aŭtoroj partoprenis en tiu konkurso kaj ricevis premiojn.

La Belartaj Konkursoj funkcias ĉiam lige al la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kiam oni anoncas kaj disdonas la premiojn. En la lastaj jaroj, la respondeco pri tiu grava agado apartenas al du monde konataj hispanoj: Miguel Fernández Martín (prezidanto) kaj Miguel Gutiérrez Adúriz (sekretario). Ĉi tiuj du intelektuloj renovigis la konkurson, aldonis novajn branĉojn kaj transformis la premioceremonion en veran spektaklon. Detalojn oni legu en nia gazetaro kaj en la retejo de UEA. Tio kaŭzis grandan impreson je la publiko, kaj certe estas la kaŭzo, ke en 2019 partoprenis rekorda

nombro da konkursantoj: 171 verkoj el 5 kontinentoj.

Unu el la plej interesaj novaj branĉoj estas “Mikronoveloj” (Premio Paula Adúriz). Ĉi tiu moderna speco de literaturaĵo ŝajne allogis multajn homojn - kiel okazas en la tuta mondo rilate al interesatoj pri literaturo. Mikronovelo estas vere interesa (kaj tute ne facila!) maniero produkti kreopovan tekston. Ĝi postulas regadon de la lingvo, precipe koncerne la kapablon interlinie sugesti pensojn kaj sentojn. Necesas fakte plena regado de la lingvaj rimedoj.

Jen ĉi tie ni reproduktas la mikronovelon premiitan en Lahti, Finnlando, en 2019:

Verŝajne

Miaj gepatroj arigis en si ĉiujn homajn kvalitojn. Ili kvazaŭ simbioze kompletigis. Objektive, oni almenaŭ rekonu, ke la evidentan senzorgecon de mia patro kompensis la konata memfido kaj efektiva fidindo de mia patrino.

La someron antaŭ mia naskiĝjaro mia patro maltrafis la starton de alloga krozado, en kiu mia patrino estis pasaĝero. Kun sia valizo en mano kaj memriproĉoj en la okuloj li korŝire konstatis, ke la ŝipo jam nereteneble foriras al la oceano.

Kiel konfirmis poste miaj du pliaĝaj gefratoj, se nia patro ne havus tiun fuŝan inklinon maltrafi jen ŝipon, jen

SUMIRE

Sudminasa Renkontiĝo de Esperanto (SUMIRE)

JOSÉ OTÁVIO V. RODRIGUES

Sudminasa Renkontiĝo de Esperanto (SUMIRE) estas regiona Esperanto-renkontiĝo, kiu okazas ĉiujare en la sudorienta regiono de Minas-Ĝeraĵo (Brazilo) ekde 2005.

Ĝi estis kreita post renkonto de S-ro Tobias Ferreira (urbo Divinópolis) kaj S-ro Antonio de Pádua Moretti (urbo Pouso Alegre) en Pouzalegre en 2004.

Urboj kiuj jam gastigis la aranĝon SUMIRE:

Pouso Alegre - 2005, Varginha - 2006, Lavras - 2007, Alfenas - 2008, Poços de Caldas - 2009, Pouso Alegre - 2010, Silvianópolis - 2011, Machado - 2012, Poços de Caldas - 2013, Caldas - 2014, Pouso Alegre - 2017, Caxambu - 2018, Poços de

nokto-trajnon, jen aviadilon, ni verŝajne ne estus naskitaj.

Vera perla mikrorakonto! La aŭtoro estas Christian Rivière, el Francio.

Jen ĉi tiu noto estu incito al brazilaj verkemuloj. Ĉu vi ne emas verki fulman historieton?

Partoprenu en la Belartaj Konkursoj 2020! ■

Caldas - 2019

Poços de Caldas estas agrabla turisma urbo en la Suda regiono de la ŝtato Minas Gerais. Ĉiuj geesperantistoj estas invititaj partopreni en la 13-a SUMIRE!

Inter la kleraj prelegantoj ni ĝuos prezentojn de D-ro Paŭlo Sergio Viana kaj José Roberto Tenório de EASP. Aliaj gravuloj prelegos pri interesaj temoj!

Do, notu en vian agendon: Tago- la 09-an de novembro 2019 • Horo: 8:00 ĝis 16:00h • Loko- Kultura Spaco de Urca • Praça Getúlio Vargas s/n° • Poços de Caldas MG.

SUMIRE : Ni renkontiĝos ĉi tie! ■

Iom da poezio...

Maria Nazaré Laroca

...la Ĵazpoezia Stilo de Langston Hughes

James Mercer Langston Hughes aŭ simple Langston Hughes (Naskiĝo: la 1-an de februaro 1902, Joplin, Misurio, Usono – Forpaso: la 22-an de majo 1967, Novjorko) estis la plej grava afrikdevena usona poeto. Li alportis al poezio la ritmojn kaj kadencon de la muziko de sia popolo, precipe la bluso. Socia aktivulo, muzikisto, dramaturgo, romanisto, novelisto, li estis unu el la unuaj pioniroj de la tiama nova formo de literatura arto nomata ĵazpoezio. Hughes estas pli konata, kiel unu el la gvidantoj de la "Harlem-Renesanco", usona kultura movado, kiu etendiĝis dum la 1920-aj jaroj.

Lia magnunm opus, plej fama verko, estas "Muntaĵo de prokrastita sonĝo" (Montage of a Dream Deferred), foje nomata Harlem. Tiu estas libro-longa poemserio eldonita de Langston Hughes en 1951. Ties ĵazpoezia stilo fokusiĝas sur priskriboj de Harlem (kvartalo de Novjorko) kaj ĝiaj plejparte afrik-usonaj loĝantoj.

Jen mia modesta traduko de famkanta poemato de Langston Hughes:

La negro parolas pri riveroj

subiris al Nov-Orleano, kaj mi
vidis ĝian kotan

Mi konis riverojn:

bruston fariĝi oro ĉe sunsubiro.

Mi konis riverojn antikvajn, kiel la
mondo, kaj pli malnovajn ol la
homa sangfluo en homaj vejnoj.

Mi konis riverojn:
antikvajn malhelajn riverojn.

Mia animo profundigis, kiel la
riveroj.

Mia animo profundigis, kiel la
riveroj.

Mi baniĝis en Eŭfrato, kiam aŭroroj
estis junaj.

Mi konstruis mian kabanon proksime
al Kongo, kaj tiu lulis min al dormo.

Langston Hughes laŭtlegas sian
faman poemon: The Negro Speaks of
Rivers

Mi rigardis Nilon, kaj levis la
piramidojn super ĝin.

(La negro parolas pri riveroj):
<https://www.youtube.com/watch?v=5mFp40WJbsA>

Mi aŭdis la kantadon de Misisipo,
kiam Abe Lincoln

ANNA LOBO

PRI KINO KAJ ALIAJ ARTOJ

GRANDAJ OKULOJ

Originala nomo: Big Eyes

Direktoro: Tim Burton

Aktoroj: Amy Adams, Christoph Walltz kaj Danny Huston

Tipo de filmo: Biografia dramo

Lanĉo: 29.01.2015 • Landoj: Usono kaj Kanado

Tempodaŭro: 1h 47min



Ne estas sekreto ke mi amas arton. Mi perceptas ke ĝi havas povon doni iun magian momenton ekster tempo, doni konscion pri io, transdoni diversajn sentojn, kaj la listo estas senlima. Mi ankaŭ interesiĝas pri biografiaĵoj, ĉefe kiam ili estas inspiraj. Kaj kio pli bonas ol nekutima interesa biografia filmo, farita de Tim Burton?

Mi devas atentigi al vi ke, kiel plejmulto el la kreaĵoj de Tim, tiu ĉi filmo estas peza. Se vi konas la direktoron, vi ja povas imagi tiun trajton. Eĉ liaj “porinfanaj” kreaĵoj estas sufiĉe profundaj, kun malfacilaj temoj kaj “nigreca fantazia etoso”, kiuj jam iĝis lia marko kiel artisto. Do, mia konsilo estas ne spekti ĝin kun infanoj.

La filmo temas pri la vivo de Margaret Keane. Ŝi estis unu el la artistinoj kies artaĵoj estis plej vendataj dum la 50-aj jaroj. Ŝia stilo

temas pri infanoj kun neproporcie grandaj okuloj. Ĝi komenciĝas per ŝia disiĝo de ŝia edzo kaj patro de ŝia filino. Ŝi malfacile stabiliĝas kaj ne trovas novan laboron. Tiam ŝi ekkonas viron, kiu promesas bonan vivon al ambaŭ.

Ĉio ŝajnas paradizo en la komenco, ĝis li ekmontras sian veran vizaĝon. Kvankam li ne pentras, li volis iĝi fama pentristo, kaj por atingi tion, li pretis fari ĉion ajn! Eĉ se tio ne estas io tre sana, kaj ekigas tre aĉan psikologian “gaslampumadon” al ŝi, manipulante kaj celante malstabligi ŝin per konstantaj malsuprenigaj vortoj kaj aliaj agoj.

Mi instigas vin spekti tiun ĉi filmon, dum ĝi disponeblas en Netflix! Mi ne konis la artiston antaŭe, do mi ege ĝojas koni la vivon kaj arton de tiu interesa pentristino. Ĉu vi kuraĝas akompani ŝiajn travivaĵojn? Ĝis la sekva filmo kaj bonan spektadon! ■

Brazilano en la Estraro de Universala Esperanto-Asocio

En la 104-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis inter la 20-a kaj 27-a de julio 2019, en la urbo Lahti, Finnlando, enposteniĝis nova estraro de Universala Esperanto-Asocio por tri-jara mandato. Unuafoje okazis voĉdonado per retmesaĝoj, kio faris la proceduron multe pli demokratia kaj travidebla. Vera evoluo en la interna funkciado kaj fidindeco de nia ĉefa Esperanto-institucio.

Inter la novaj estraranoj troviĝas juna brazilano, Fernando Maia, kiu elektiĝis vicprezidanto kaj zorgas pri la Centra Oficejo, Statuta Reformo, Eksteraj Rilatoj (krom Unesko), Ameriko, Rilatoj kun TEJO, Rilatoj kun la Membro-Organizoj.

La nova prezidanto estas la konata, tutmonde respektata profesoro Duncan Charters. La Ĝenerala Sekretario estas Aleks Kadar.

UEA fondiĝis en la jaro 1908, pro iniciato de la juna sviso Hector Hodler, Théophile Rousseau kaj aliaj aktivuloj. Dum pli ol unu jarcento ĝi fariĝis la motoro, kiu tutmondigis Esperanton, tiel ke nuntempe ĝi havas membrojn en 120 landoj kaj okazigas gravajn eventojn - ekzemple la Universalajn Kongresojn.

Tamen, dum la lastaj jaroj, la nombro da membroj en UEA iom

post iom ŝrumpas. Jen maltrankviliga fenomeno. Kutime, oni atribuas tion al la movado de Esperantistoj per interretaj komunikrimedoj, kiuj ne dependas de aliĝoj. Ne temas do pri malfortiĝo de la Esperantomovado en la mondo, sed simple pri alia vojo, kiun la Esperantouzantoj iras.

Tamen, se tia interpreto estas prava, ĝi ankoraŭ estas maltrankviliga. Ni ne rajtas esti trankvilaj, ke la batalado por la lingvo Esperanto okazas nur interrete. La Esperanta movado, kun sia kulturo, sia interna ideo, siaj agadoj por konkreta plibonigo de komunikado en la mondo, ne devus esti nur virtuala. “Homoj kun homoj” ne devus reduktiĝi al “ekranoj kun ekranoj”. Tio estus tre danĝera por la postvivado de nia komunumo.

Pro tio estas grave, ke ni apogu (kaj aliĝu al) UEA. Tio ne signifas, ke mi kritikas aŭ malŝatas la interretan uzadon. Tute male! Interreto estu valorega instrumento, sed ne anstataŭanto de niaj homaj, konkretaj kontaktoj. Kaj tio validas por ĉiuj niaj internaciaj, landaj, regionaj kaj lokaj institucioj.

Ni plu agadu kiel konkretaj movadanoj! Ni apogu Universalan Esperanto-Asocion!

Meditaĵoj de Millôr Fernandes



Millôr Fernandes (Rio-de-Janeiro, 1923-2012)
estis brazila desegnisto, humoristo, verkisto,
dramisto, poeto, tradukisto kaj ĵurnalista.

Li publikigis siajn tre originalajn verkojn
en pluraj revuoj kaj ĵurnaloj,
preskaŭ ĉiam kun forta ironio,
sarkasmo kaj pikanta kritikemo.

Homoj, kiuj tro multe parolas, ĉiam mensogas, ĉar fine
elĉerpiĝas ilia stoko da veraĵoj.

Tedulo: homo kiu interesiĝas pri ni pli multe, ol ni
interesiĝas pri li.

Kiel admirindaj estas homoj, kiujn ni ne bone konas!

Demokratio estas kiam mi ordonas al vi, diktaturo estas
kiam vi ordonas al mi.

Neniam eldiru mensogon, kiun vi ne povus pruvi.

Ni devas ne rezisti kontraŭ tentoĵ: eble ili ne revenos.

Neniu scias, kion vi aŭskultas, sed ĉiuj tre bone
aŭskultas, kion vi diras.

Homo estas sincera ateisto nur kiam li perfekte sanas.

Ŝtelu ankoraŭ hodiaŭ! Morgaŭ eble tio estos neleĝa.

(Esperantigis PSV)

Financoj: la iluzio de kono kaj la problemo de la eksceso de memfido en la akcia merkato

CRISTOVÃO ROCHA SOUSA

Nu, de kie devenas la eksceso de memfido? Parte, de la iluzio de kono. Tio rilatas al la tendenco de la homoj fidi, ke la "precizeco" de iliaj supozoj pligrandiĝas laŭgrade kiel ili akiras pli da informoj.

Alivorte, ju pli da informoj, des pli da konoj kaj, konsekvence, des pli granda povo de decido. Sed, ne ĉiam estas tiel. Ekzemple, kiam oni ludas ĵetkubon sen difekto, kiu nombro devas aperi? Kiom certaj ni estas pri tiu rezulto? Estas klare ke, se oni elektas iun nombron de 1 ĝis 6, oni havas 1/6-on de ŝanco trafi. Sed, se en la lastaj tri fojoj aperis la nombro 4 kaj oni ludas la ĵetkubon denove, kiu nombro aperos? Kian ŝancon ni havas por ĝusta atingo? Se la ĵetkuboj ne estas difektitaj, eĉ tiel ni povas ŝanĝi iun nombron de 1 ĝis 6 kaj havi 1/6-on de ŝanco trafi. La aldona informo ne pligrandiĝas la kapablon antaŭvidi la rezulton, sed multe da homoj fidas, ke la nombro 4 havas malpli da ŝanco lotiĝi denove. Tiuj homoj pensas ke la ŝancoj trafi estas

pli grandaj ol reale ili estas. Tio signifas, ke la nova informo faras la homojn pli fidiplenaĵ en iliaj antaŭvidoj, eĉ se iliaj ŝancoj trafi ne ŝanĝiĝis.


Pro la uzo de interreto, la investistoj havas aliron al granda kvanto da informoj, kiel datumbazaj historioj, prezoj, invento-profitoj, operacia efikeco de entreprenoj, aktualaj informoj, novaĵoj, stokkvanto, ĉio en reala tempo. La aliro al informoj por individuaj investistoj estas preskaŭ tiel bona kiel tiu disponebla al la profesiaj. Tamen, la plimulto el la homoj ne havas instrukciojn nek sperton kiel la profesiuloj, tial estas malpli da kondiĉoj por kompreni la informojn. Alivorte, tiu lavango de informoj ne konvinkas tiom, kiom ili pensas, nur ĉar mankas bazo por interpreti ilin.

Multaj individuaj investistoj konas siajn limojn kaj eniras la reton kiel ulo bezonanta helpon. Ili povas preni rekomendojn de analizistoj, fari abonon kaj mendon de specialistaj

servoj, partopreni en grupo de interparolado kaj koni aliajn opiniojn en vatzapaj retmesaĝoj kaj retpaĝoj. Kiu investas enrete, tamen, tiu devas kutimiĝi prudente analizi informojn akiritajn en babilĉambroj: ne ĉiuj rekomendoj venas de specialistoj. Verdire, estas malmultaj sekuraj fontoj. Freŝdata studo ekzamenis borsakciojn rekomenditajn per mesaĝoj publikitaj en du grupoj de babilado en la interreto. La pli grandaj akcioj de la borso havas bonegan rentumon aŭ malbonegan rentumon en la lastaj tempoj. La akcioj kun tre bona rendimento en la antaŭa monato estis rekomenditaj por aĉeto (strategio sekvi la merkaton). En la sekva monato, tiuj akcioj havas rentumon sub de nivelo de la merkato je pli ol 19%. Jam la aĉetaj rekomendoj kun malbonega

rendimento en la antaŭa monato (strategio de valoro) superas la meznombro de la merkato je pli ol 25%, en la sekva monato. La akciaj rekomendoj por aĉeto ne rentumis malsame kompare kun la merkato.

Oni konstatis, en alia studo, ke la pozitivaj mesaĝoj en la retpaĝo ragingbull.com ne estas ligitaj al pozitivaj gajnoj en sama tago aŭ sekva semajno. Samtempe, nenormala kvanto da mesaĝoj estas ligita al kvanto pli alta de transakcioj. Tiaj studoj konkludas, ke la rekomendoj de tiuj retpaĝoj pri akcioj, ĝenerale, ne havas valorajn informojn. Sed, se investistoj kredas, ke tiuj rekomendoj estas pli grandaj ol iliaj konoj, tiam ili eble estas tro fidplenaj pri siaj investaj decidoj. La pligrandigo de operaciaj kvantoj indikas, ke tio povas esti vero. ■



easp.org.br/butiko

Titolo: La nigra birdo kaj aliaj rakontoj

Verkisto: Paulo Sérgio Viana

Paĝoj: 124

Pezo: 182 g

Prezo: R\$20,00

Super la Juro, kaj Justeco

JOSÉ MAURO PROGIANTE

Kelkaj homaj talentoj, kiel prudento, modereco kaj kuraĝo, estas virtoj nur se ili servas al la bono. La justeco, tamen, estas bona en si mem. Laŭ André Comte-Sponville, ĝi estas la horizonto de ĉiuj virtoj kaj la leĝo de ilia kunekzistado.

Ĉu estus juste, por kolektiva feliĉo, oferi kelkulojn? Ekzemple, Dostojevski demandis, ĉu oni rajtus torturi infanon por savi la homaron. Tiajn tiklajn demandojn alfrontis multaj pensuloj, kaj la komuna respondo estas ke ne, ĉar, kiel diris Kantio, “se malaperas la justeco, nenion plu valoras la fakto, ke vivas homoj sur la Tero”. Sen la justeco, la aliaj valoroj ne plu estus veraj valoroj, sed nur interesajoj.

La justeco estas dusignifa: ĝi estas konformeco kun la juro kaj egaleco aŭ proporcio. Kvankam tiuj du sencoj estas ligitaj, ili estas malsamaj, kaj nur pro tiu dua senco la justeco elstariĝas inter la aliaj virtoj. En la unua senco, tio estas, en tiu senco de respekto al la leĝo, la justeco povas eĉ esti malbona. Tio okazas, ĉar la leĝoj estas farataj de la plej multnombraj (demokratie) aŭ de la plej fortaj (diktature), kiuj povas ne esti la plej justaj kaj plej inteligentaj. En la dua senco, de egaleco, la justeco koncernas pli la moralon, ol la juron. Tiusence la justeco pravigas eĉ la malobeon al la leĝo, se ĉi tiu estas malbona. Alivorte, se la plenumo de la leĝo povas okazigi

morale neakcepteblan malegalecon, estas juste ne respekti kaj kontraŭbatali ĝin. Tion faris Antigono, la mita filino de Edipo, kontraŭstarante la ordonon de la reĝo Kreono; Ghandio antaŭ la brita imperio; kaj la anoj de la franca rezistado dum la Dua Mondmilito, dum la nazismapoga reĝimo de Vichy.

Sokrato ne pensis tiel. Kvankam lia kondamno estis maljusta, li rifuzis la proponojn fuĝi kaj preferis morti ol malrespekti la leĝojn de Ateno. Tamen lia ekzemplo ne malvalidigas la rajton malobei maljustajn leĝojn, ĉar tiuokaze la viktimo de la maljusteco estis li mem. Eble li agus malsame se la viktimo ne estus li.

Evidente estas dezirinde, ke leĝoj kaj justeco marŝu kune, tamen foje tio ne okazas. Iam la sklavigo de homoj estis laŭleĝa kaj hodiaŭ, en multaj landoj, ankoraŭ estas laŭleĝaj diskriminacioj genraj, seksaj aŭ rasaj. Kiel diris Martin Luther King, malobei maljustan leĝon estas ne nur rajto, sed morala devo.

Ni konsideru, tamen, ke la pravigo por kontraŭstaro al normoj, nome de la justeco, ne povas esti nia nura individua intereso. Ni ne rajtas rifuzi leĝon pro simpla malŝato aŭ ĝena eta malpliigo de nia libereco.

Tio, kio pravigas malobeon al la juro havas kolektivajn trajton, ĝi estas nia civitana devo lukti por ke neniu en la socio suferu maljustecon. ■

Kial Filozofio kaj Sociologio en Bazaj Lernejoj?

ALEKSANDRO PRADO

Filozofio kaj Sociologio, kune kun Geografio kaj Historio, apartenas al la homaj sciencoj, kies studoj estas devigaj en bazaj lernejoj en Brazilo. Pensi pri la gravo instrui en la lernejoj estas pensi pri kio estas grava por la estonto de nia socio. Nuntempe, estas internacie konsilite, ke la lernejoj devas formi bonajn civitanojn, kiuj kapablas scii kunvivadi, scii ŝanĝi sian ĉiutagan vivon, scii kompreni aliulan mondon. Tiuj kvalitoj estas senpartiaj aŭ naciaj, ili estas internacia penso pri konstruo de pli bona mondo.

Tiam, venas Filozofio kaj Sociologio. Ĉi-tiu lasta havas, krom propran lerno-objekton, la devon, laŭ la filozofo kaj sociologo Gilson Teixeira Leite, prezenti la problemojn en la vivo de la lernantoj rilate al iliaj agadkampoj kaj rezonigi la junulojn pri ilia ekzisto kaj konsekvencoj en la socio. Tio estas, evoluigi la kritikan penson. Ni memoru, ke kritiko estas senpartia juĝo kaj ĝi estas tute privata, de la homo mem. Amaury Cesar Moraes, Sociologo kaj Filozofo el Universitato de San-Paŭlo (USP), verkas, ke Filozofio kaj Sociologio estas ĉiam elvokataj por debato, kiam aperas problemoj tiklaj, kiuj rekte influas aŭ interesas la homaron, tiamaniere, la resumo de lia verko estas: se tiaj homaj sciencoj estas

gravaj por debatoj, ili estas devigaj en la lernejoj.

Interalie, la aŭtoro asertas: Filozofio kaj Sociologio ne respondas ĉion, sed tia estas la fina objekto de tia scienco: evoluigi la scivolemon, la demandon, la rezonon de la homoj. Sume, elvolvi de la homoj la kritikan sencon.

Laŭ la Filozofo Mario Sergio Cortella, Filozofio naskiĝas en homoj pro tio, ke demandi estas propra eco de homoj, kaj ke Filozofio ne simple instruas nin pensi, tial ke tio estas eco de la homoj; kaj Filozofio ankaŭ ne simple instruas nin pensi bone, ĉar estas bonaj pensuloj kaj mispensuloj, ekzemple, naziismo kaj diktaturoj havis siajn mispensulojn. Laŭ Cortella, Filozofio, kiel scienco, helpas la homaron demandi sin, tiamaniere ke oni forkuras de la evidentaj pensoj, ĉar ĝi permesas aliron al pensoj pri suspektoj profundaj de la problemoj el la homa vivo. Suspekti estas sin demandi kial la aferoj estas tiaj, kiajn ni vidas.

Doktorino pri edukado Renata Aspis, asertas en sia magistriĝa tezo, ke Filozofio edukas junulojn por esti tiaj, kiajn ili volas, verdire senbridigas la sentojn kaj pensojn de la junuloj por ke ili kreu sian sencon esti liberaj kaj la sencon estri sian vivon. Malgraŭ tio, estas tikla konsekvenco:

la mondo funkcias surbaze de kapitalismo, tiel ke oni movas sin al aĉeto kaj gajno flanke de la edukado, kiu movas sin al pretigo de junuloj, kiuj estu liberpensaj. Du kontraŭaj movoj, kies rezulton la profesorino ne scipovas klarigi.

Konklude, instrui Filozofion kaj Sociologion en la bazaj lernejoj celas formi homon por kunvivi en la socio, per si mem ĝi gravas, malfacile taksu ĝin netaŭga. Entute, ĉiuj lernoobjektoj en la lernejo celas formi homojn bonajn por ke la mondo estu pli bona, fine.

Gramatiko

Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WESCHLER

Demando

En la frazo [...] la obstina emo de tiom multaj homoj detruis vivojn kaj ankaŭ la solan loĝejon disponeblan por la homaro: nian belan planedon, la Teron. Ĉu la uzo de la akuzativo post la dupunkto estas ĝusta?

Respondo

Malmultvorte: jes, la akuzativo post la dupunkto en la ĉi-supra ekzemplo estas ĝusta, ĉar temas pri apudmeto (ankaŭ nomata apozicio), kiu rilatas

Referencoj:

SARANDY, Flávio Marcos Silva. Reflexões acerca do sentido da sociologia no ensino médio. 2010.

MORAES, Amaury Cesar. Por que sociologia e filosofia no ensino médio?. 2009.

ASPIS, Renata Pereira Lima. O ensino de filosofia para jovens com experiência filosófica. 2004. 160p. Dissertação (mestrado) - Universidade Estadual de Campinas, Faculdade de Educação, Campinas, SP.

Video: Filosofia no dia a dia com Mario Sergio Cortella. <https://www.youtube.com/watch?v=3oxP-wjI4IE>

al la rekta objekto. Se ĝi rilatus al la subjekto, oni kompreneble ne uzus akuzativon.

Klarige: apudmeto estas esprimo, kiu ne esencas al la frazo, sed kiu klarigas aŭ plivastigas ĝian sencon. Apudmeton oni ordinare disigas de la antaŭa frazparto per paŭzeto, signita per interpunkcio. La kazo de apudmeto estas la sama de tiu frazparto, al kiu ĝi rilatas. Alivorte: se la apudmeto rilatas al antaŭa frazparto en la nominativo, ĝia kazo ankaŭ devas esti la nominativo; sed se la apudmeto rilatas al antaŭa

frazparto en la akuzativo, ĝia kazo ankaŭ devas esti la akuzativo.

Jen sekvas kelkaj ekzemploj pri apudmeto kun nominativo (la apudmetojn mi reliefigis graslitere):

La koko, trumpetisto de l' mateno, per sia laŭta, forta, hela voĉo el dormo vekas dion de la tago. (Hamleto)

Mi scias, ke brava homo, metiisto, svatiĝas al vi, la gantisto Erik. (Fabeloj de Andersen)

Ni esprimas nian koran dankon al sinjoro Schleyer, la unua kaj plej energia pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia. (Originala Verkaro)

Kaj jen sekvas kelkaj ekzemploj pri apudmeto kun akuzativo:

Adam ekkonis Evan, sian edzinon. (Malnova Testamento)

La diablo lin prenu, la sentaŭgulon! (Hamleto)

Malsaĝulo vi nomu lin, malsaĝulo, la maljunan kanajlon! (La Revizoro)

Tie vi vidis mian fraton, la duan dion de dormo, kiun oni ankaŭ nomas Morto. (F. Andersen)

[...] oni perfortis ĉe vi sian fratinon, filinon de sia patro [...] (Malnova Testamento)

Ofte la apudmeton enkondukas la vortoj nome, alivorte aŭ tio estas. Koncerne la ĉi-lastan esprimon, gravas emfazi, ke ankaŭ ĝi ja povas

enkonduki apudmeton kun akuzativo, malgraŭ la verbo estas; efektive, ĝi konsistas en memstara kombino, kiu havas signifon tre similan, se ne egalan, al tiu de alivorte. Do, jen koncernaj ekzemploj:

Ĉu vi ne deziras trarigardi nun kelkajn instituciojn en nia urbo, nome la filantropiajn kaj aliajn? (La Revizoro)

[...] mi ĵus resendis al vi lin mem, alivorte, mian propran koron; [...] (Nova Testamento)

[...] ĉiuj Izraelidoj iris en Jerusalemon (tio estas, en Jebuson). (Malnova Testamento)

Sed David venkoprenis la fortikaĵon Cion, tio estas, la urbon de David. (Malnova Testamento)

Fine, konsideru du ekzemplojn konstruitajn de mi, kiuj montras la diferencon inter apudmeto sen kaj kun akuzativo:

En superbazaro troviĝas pluraj manĝaĵoj: viando, pano, lakto kaj sukero.

Mi aĉetis en superbazaro plurajn manĝaĵojn: viandon, panon, lakton kaj sukeron.

Aldonajn klarigojn pri apudmeto vi trovos, ekzemple, ĉe Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG), verkita de Bertilo Wennergren. ■

13^o

Congresso Paulista de Esperanto

EASP / Prefeitura de São Carlos

São Carlos/SP: 12 - 13 outubro 2019

Local do evento:

Escola Estadual Doutor Álvaro Guião

Av. São Carlos, 2190 - Centro

<http://easp.org.br/congresso>

Realização:



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Contato com a
organização local:**

Gilberto Menegasso

(16) 3307-1132

menegasso.gilberto@gmail.com

Apoio cultural:



CEMAC
CENTRO MUNICIPAL DE ARTES E CULTURA



**Prefeitura de
SÃO CARLOS**

Vem curtir

José Roberto Tenório

13^o

Congresso Paulista de Esperanto

São Carlos : 12 - 13 outubro 2019

Casa do Pinhal

A Fazenda Conde do Pinhal, além de sua própria história, conta também sobre a Vila de São Carlos do Pinhal, nascida na sesmaria da família Arruda Botelho. Em seus 45 hectares, nos faz vivenciar uma fazenda cafeeira, e nos leva às nossas próprias raízes. Seus pomares e jardins inspirados nos parques franceses, a arquitetura, objetos e obras de arte, ambientes de época, nos dão experiências inesquecíveis como subir os degraus da escada d'água da mesma forma que fazia a Condessa do Pinhal diariamente há um século atrás. Depois, degustar um delicioso café colonial feito de grãos colhidos na própria fazenda, acompanhado de bolos e doces.

local do evento

*Escola Estadual Doutor Álvaro Aguião
Av. São Carlos, 2190 - Centro*

<http://easp.org.br/asocio/congresso>